

Tagiĝo 25

*Cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈRS.
Eldonas Dŭm osvĕty, odbor Esperanto, Opava – 1955/IV,
adr.: Kuzník, J. Rooseveltova 17, Opava*

Pri nia porpaca laboro

Post la fondiĝo de Mondpaca Esperantista Movado /MEM/ mi ekkomprenis, ke ĉi okaze ankaŭ mi devas eluzi mian scion de Esperanto por la porpaca laboro Tial mi novembre 1953 promesis al la estraro dum la konferenco de Pacdefendantoj de distrikto Opava mian kunlaboron.

Por plenumi mian promeson mi petis preskaŭ ĉiujn reprezentantojn de MEM, ke ili instigu ian packomitaton forsendi salutleteron al la novelektita packomitato. Sed mia peto ĉe tiuj reprezentantoj montriĝis senrezulta. Nur mia korespondanto k-do Algat Pettersson en Göteborg – Svedlando – plenumis mian deziron kaj instigis la Eriksbergan packomitaton forsendi salutleteron, kiu poste efikis en Opava tre surprizige kaj ĝojige. Memkompreneble, nia packomitato korege respondis kaj poste sekvis novaj leteroj.

Dumtempe alvenis al Opava el Japanujo deklarioj kaj rezolucioj kontraŭ la Hidrogenbombaj eksperimentoj kiel malesperis japana alvoko de japana popolo el tuta mondo atendante la revokon. Mi konatigis kelkajn organizojn de Opava pacmovado instigante ilin al la resonado. Efektivigante mesaĝon kaj esprimon de solidareco tiuj ĉi organizoj. Distrikta komitato de kontraŭfaŝista Asocio en Opava, Distrikta komitato de Pacdefendantoj en Opava, Komitato de Virinoj en Opava, Regiona komitato de kontraŭfaŝista Asocio en Ostrava kaj fine la konferenco de Esp. junularo okazinta en Hradec apud Opava.

Ĉiuj niaj leteroj senditaj al aranĝanto: la Universitato en Kioto - efikis je niaj japanaj pacamikoj sensacie kaj ĝojige. Kiel niaj japanaj amikoj dokumentis, preskaŭ ĉiuj niaj mesaĝoj estis publikigitaj en multaj esperantistaj kaj japanaj gazetoj. La esperantista grupo de kiota Universitato sendis rekompence kvar memorkajerojn, kiuj enhavas dudek japanlingvaj tradukaĵojn de leteroj, alvenintaj el tuta mondo. Mi ilin solene transdonis al ĉiuj adresatoj.

Krom tio laŭ peto de japanaj amikoj mi perigis korespondadon en rusa lingvo inter ili kaj du altlernejoj en Opava. Specialan laŭdon meritas k-do Hidoo Sakaguĉi, reprezentanto de esperantorondeto en Osaka, Fremdlingva Fakultato, kiu kunlaboras kun kiota Universitato.

Al la ĉi-jara konferenco de Pacdefendantoj en Opava alvenis du salutleteroj de packomitatoj en Göteborg kaj Helsinko, kiuj estis de delegitaro entuziasme aplaŭditaj.

Eble estus bone diri kiamaniere ni realigas la korespondadon? La salutanto skribas sian salutleteron nacilingve al kiu mi pretigas Esp. tradukon. Ambaŭ tiuj ĉi folioj estas sendataj al fremdlandaj amikoj, kiuj mem prizorgas tradukon en sian nacilingvon.

Mi opinias, ke se ni volas eviti la trian mondmiliton, ni devas daŭre kaj efike kontraŭ ĝi labori per la konvinkado de popolo eb ŝtatoj, kie la paco estas minacita. Ni devas imputi al ili, ke ni ne estas iliaj malamikoj, sed ke ili devas serĉi sian malamikon tute alie, nome en la vicoj de siaj propraj kapitalistaj rondoj.

Antonín Frantl

Jen vi povis vidi nur erojn de la laboro de s-ano Frantl, memkompreneble li ne volas laŭdi sin mem per pluaj klarigoj de sia agado sur kampo mondpaca. Sed ni povas diri, ke kvankam li ne estas jam ia junulo, sed homo maljuna, tamen lia koro ankoraŭ batas maltrankvile, se ie oni parolas pri la renovigo de germana naziismo aŭ se ie estas denove preparata la nova terura mondmilito kun modernaj armiloj. Li estas vere aktiva, senriposa batalanto por la eterna paco tutmonda, kie li plene uzas Esperanton kiel ĉefan ŝlosilon al ĉiuj koroj. Li per tia laboro neentrudeme propagandas Esperanton, kaj tiamaniere li konvinkigas eĉ la plej grandajn malamikojn de Esperanto pri ĝia altvalora signifo kaj igas tiel ĉefe ĉe gravaj funkciuloj de nia reĝimo la aprobon de nia Esperanta laboro kaj detruas la iamajn onidirojn, ke Esperanto estas kosmopolisma. Ni nur deziras, ke li ankoraŭ longe laboru por nia afero kaj ke ni odte aŭdu pri la sukcesoj en lia porpaca kaj samtepe Esperanta laboro:

Kuzník Jar.

NI PARTOPRENIS ESP. KUNVENON en BOHUMÍN

La 27-an de marto estis kunvokita la regiona kunveno de Esperantistoj en Bohumín. Ĉeestis proksimume 80 gesamideanoj, ĉefe el Ostrava regiono, sed ankaŭ alveturis karaj gastoj el diversaj regionoj de nia respubliko. Kore estis bonvenigita s-ano Lamačka, la redaktoro de nova nia gazeto "La Spegulo" el Trenčín, Slovakio, nia estimata s-ano Mařík el Praha kaj nia junulara avangardo – s-anoj Novobilský Vlast., Novotný kaj Kratochvíl el Praha kaj s-ano Antoš el Děčín.

Post la bonvenigo de la gastoj prezentis junaj s-anoj el Ostrava la novelon de K. Čapek "Poeto" en la teatra aranĝo laŭ la Esp. traduko de s-ano Odehnal el Karviná. Tiu ĉi kultura enmetaĵo estis tre bona okazo montri kiel pliriĉigi la kunvenojn kaj estus dezirinde, ke ĉiam estu preparita ia malgranda simpla amuza programo.

Valora estis la prelego de s-ano Janouš – Esperanto en batalo por paco. Li trafe klarigis al ĉiuj, kiel argumenti kaj defendi la kalumniojn kaj parolojn kontraŭ Esperanto.

Pri la novaĵoj en Slovakio raportis al ni s-ano Lamačka. Krom tio li instigas ĉiujn ke estu sendataj por "La Spegulo" la diversaj kontribuaj. Se ni deziras altkvalitan gazeton, ni devas plej grandskale kunlabori.

S-ano Mařík klarigis la distribuadon de gazeto "Herolda de Esp." kaj substrekis, ke ĝi cirkulu inter samideanoj en grupoj, por ke ĝi estu multe legata. Bedaŭrinde oni ankoraŭ ne povas ĝin aboni en eksterlando kaj nur dank' al redaktoro de tiu ĉi gazeto s-ano Teo Jung, kiu ĝin senpage en certa kvanto liveras al nepagipovaj landoj ni povas sekvi la novaĵojn en la tutmonda Esperantomovado.

S-ano Mohapl priparolis ankoraŭ la signifon kaj taskojn de en Olomouc fondita Konsulta kolegio.

Poste sekvis la ne tro taŭga longdaŭra diskuto pri venontaj Esp. kunvenoj. Temis pri la kunvenoj en Bystřice pod Hostýnem, en Třinec kaj la tradicia kunveno sur monto Čantoria. La ne fruktodona diskuto eĉ ne finis per ia konkreta decido kaj kaŭzis, ke multaj foririnte post la fino de traktado el Bohumín forportis impreson de malbona kunveno.

Ĝuste junularo kiu ĉeestis sufiĉe multnombre la kunvenon, estis dum tiaj longaj, neutilaj paroladoj maltrankvila kaj poste estas klare, kial niaj regionaj kunvenoj ne estas tiel forte de junularo vizitaj.

Tamon post la kunveno, dum tagmanĝo Junularo en amika interbabilado kun s-ano Mařík, Kočvara kaj Novobilský pritraktis la preparojn de instruado por la Somera Esperanto Tendaro.

Jak

Internacia vagonaro

Mi tre ofte veturas per internacia rapidvagonaro "Paco" Praha-Berlin. Tie mi havas eblecon paroli kun multaj fremdlandanoj kaj demandi ilin pri diversajtoj, precipe pri ilia opinio koncerne Esperanton. Kelkaj el ili parolas pri nia lingvo favore, aliaj malpli favore. Malgraŭ tio, ĉiuj entute sentas neceson de bona internacia interkompreno kaj deziras al si sincerajn internaciajn rilatojn.

Oficisto de bulgara ambasadorejo en Berlin estinte gimnazio konis Esperanton. Al li plaĉas malmoleco de nia lingvo, sed li badaŭras, ke li jam multon forgesis. Membro de laborista dalegitaro veturanta al Berlin konkludas, ke Esperanto havas multajn avantaĝojn en internacia interkompreno.

Iam mi ekĝojis, ke mi ricevis lokbileton al kupeo, kie sidis homoj de diversaj profesioj. Kelkaj el ili veturis, al Praha, aliaj al Budapest. Kvankam ni tute ne konis nin reciproke antaŭ la envagoniĝo, ni ĉiuj tre rapide interkonatiĝis. Apenaŭ la rapidvagonaro traveturis antaŭurbajn vilaĝojn apud Praha, oficisto de germana ambasadorejo en Budapest alvokis kelneron el manĝvagono kaj mendis por ĉiu el ni glason da vino. Ni tostas je internacia amikeco. Laŭ mia kutimo mi demandas miajn novajn geamikojn. Germana inĝeniaro, kiu travivis tri semajnojn en Praha kaj nun revenas al DDR diras, ke nuntempe oni devas eluzi ĉiujn rimedojn por konservi pacon kaj Esperanto ankaŭ povus helpi en ĉi tiu batalo. Bonhumora homo, sidanta en angulo ĉe la fenestro, diras, ke plej praktika perpaca rimedo estas internaciaj nuptoj. Lia kontraŭsidanto rememoris pri anekdoto, kaj komencis ĝin rakonti. Ni ĉiuj kore ekridis. La bonhumora homo prenis sian aktujon el la retbreto, elŝovis el ĝi botelon da vino kaj donis al sia najbaro, ke li trinku. La botelo rondiris el mano al mano. Nun en la kupeo homoj fariĝis geamikoj kvazaŭ ili estus reciproke konintaj jam dum longaj jaroj. Niaj koroj rapide fariĝis reciproke proksimaj, kvankam ni konis nin nur iomete pli ol unu horon. Mi preskaŭ bedaŭris, kiam mi devis antaŭ la ŝtatlimo elvagoniĝi. La manpremoj de miaj fremdlandaj geamikoj estis trege sinceraj. Nia adiaŭo estis "Amikeco".

"Amikeco," karaj gekamaradoj.

Miŝa

ESTAS EBLE VIZITI ĈSR!

Ni denove atentigas niajn enlandajn s-anojn fari vastan varbadon ĉe fremdlandaj esperantistoj, por ke ili venu al spartakiado kaj samtempe vizitu la grandskalan konferencon de ĉeĥoslovakaj s-anoj en Gottwaldov, kiu okazos tuj post spartakiado, t.e. de 7.— 10-a. de julio tiujare. Klarigu al viaj amikoj en eksterlando ke la vizito al nia lando estas ebla kaj ke ili povos ĉi tie resti ankaŭ post la tutŝtata festo de sportulaj gimnastoj. Ju pli granda vizito de ili estos, des pli grandan propagandon ni povos fari por nia E-movado ĉe ni. La tempo progresas, do agu tuj, ĉar poste ili jam ne ricevas la enirpermeson. Ĉiu interesiĝanto sin turnu almenaŭ ĝis la 30a de aprilo al ĉeĥosl. legacio de sia lando pri detaloj.

Sovaĝa rozo

Jaroslav Seifert

El pilgrimfest' mi foje iris
tintil' sonoris per arĝent'.
Deŝiri rozojn mi deziris,
sed min pikvundis dornoj cent.

Kaj tamen ĝian dolĉsovaĝon
mi amis dum la tuta viv'.
Por ĉiam mian etjunaĝon
ĝi orlis sur la hejmdekliv'.

Vi metis freŝan belon, Dio,
en la petalojn de la roz'.
Ekdormis eble cetonio
en burĝoneto por ripoz'.

La knabo, kiu nur rapidis,
nun haltis kun raviĝ' en brust'.
Punktitajn ovojn li ekvidis
en ŝtonoj sub la rozarbust'.

Tegmenton etan li revidis,
dometojn kiel en la sin'.
Pri l' ŝton' kun musko li ekridis,
li kiel hejme sentis sin.

Rigard' kun amo ĝin karesas,
se mi ĝin vidas nun en flor';
junaĝon ja mi malforgesas,
vidante frondon en kolor'.

Jaroslav Seifert estas sendube unu el niaj plej bonaj kaj plej ŝatataj vivantaj poetoj. per vortoj simplaj kaj rimadoj nerafinitaj li scias profunde tuŝi niajn koron kaj animon: jen li pensigas nin, jen li nin ĝojigas per versoj dolĉaj kaj vigle ŝprucantaj.

La poemaro "Šel malíř chudě do světa" (el kiu estas prenita la poemo) estas kolekto de belaj poemoj, kiuj estis inspirataj kaj skribitaj laŭ bildetoj, pentritaj de Mikoláš Aleš.

Papilio, rozeto, hundo ... jen temoj, kiuj fariĝas vivaj en versoj de la poeto.

La poemon "Sovaĝa rozo" tradukis Jaroslav Mráz, ano de E-jun. Praha.

NI HELPAS AL NI!

Libro de hungara verkisto Ludoviko Totsche: "De paĝo al paĝo", eldonita de estinta Literatura Mondo en Budapoŝto estas intense serĉata. Pri la pruntebleco informu VI. Novebilský, Na Újezdě 11/III, Praha III.

Ĉu hazarde iu samidean/in/o ne trovis arĝentan krajonon okaze de la Nikolaa vespereto aranĝita decembre de Junularo en Praha? Eventualajn informojn sendu al nia redakto.

Libro "Kantantaj kordoj" de Baghy kun notoj estas urĝe serĉata. Ni baldaŭ redonos la libron. Por via afableco ni dankas al vi. Sendu al adreso de nia redakto.

TAGIĜO vokas vin!

Skribu artikolojn por Tagiĝo. Ĉiu via kontribuado garantios la riĉan enhavon de nia cirkulero. Por viaj felietonoj, noveloj, priskriboj kiel eble originale verkita estas al vi niaj legantoj dankemaj.

Aŭ ĉu vi volas nur pasive legi kaj neniel kontribui al nia komuna laboro?

Viaj sugestoj, kritikoj kaj proponoj pri la enhavo de nia cirkulero estas tre bonvenigataj. - Ĉu plaĉas al vi Tagiĝo? - Skribu al ni multnombre.

Skribu ankaŭ la fremdlandaj abonantoj al nia redakto!!!

SOMERA TENDARO

Pluaj informoj pri la SET, okazonta ĉe Vranovská přehrada en tri etapoj po 14 tagoj de 2-a julio ĝis 13-a de aŭgusto. Unua etapo por infanoj malpliagaj ol 15 jaroj. Dua etapo kursoj por komencantoj kaj iom progresintoj. Tria etapo kursoj de kat. C, D, konversacia kaj per Esp. instruistoj.

Garantiitaj instruistoj por kursaro estas: Th.Kilian, s-ano Mařík, Novobilský, Dr. Kočvara kaj aliaj. Banado proksimume 60 m de tendaro.

Du tuttagaj ekskursoj: Unu per vaporŝipo al Vranov /trarigardo de kastelo/. Dua ekskurso al Nový Bítov; al ruinejo kastelo Kornštýn kaj trarigardo de kastelo Bítov. Por reveno uzata vaporŝipo.

Pri informoj turnu vin al sekretarioj: Jan Werner, Helceletova 16, Brno.

Nokta kroniko de SET Žimrovice 1954

Estis kutime dum nokto gardi la tendaron. De vespero ĝis mateno alterniĝis ĉiam kelkaj gardantoj. Ĉar estis ofte enue stari kaj ĉirkaŭrigardi la tendaron estis decidite ke la noktaj gardantoj skribos ion en la kronikon por tiu ĉi afero destinita.

Jen ni alportas unu fragmenton el ĝi. Ne miru, se la ritmo aŭ versoj ne estas centpercentaj. Ja, estis skribita sub influo de luno.

Naturo kantas ludante
luneto brilas gardante,
tendar' en dormo sonĝe silentas,
pejzaĝ' kun paco amon prezentas
Ĉi tiu mond' por ni la paradizo,
en kiu regas jam nenia krizo,
neniaj tie vivas luphomoj,
eĉ ne aliaj mitaj fantomoj.
Por ni nur unu muziko sonas,
ceteran tute ni ne bezonas,
en nia blazonŝildo amo, paco kaj fratsento
ni bona estas junularo, plena de gajvento.
Flugu niaj melodioj, sonu niaj ĝojaj kantoj,
venku paco en la mondo, malaperu mortsemantoj!

Vlad. Novotný

KOREKTO de ĉefaj eraroj en la pasinta N-ro de Tagiĝo.

Ni petas afable pardoni al ni la kelkajn erarojn, kiuj troviĝis en la pasinta Tagiĝo, sed pro diversaj teknikaj kaŭzoj ni rapide faris la malnetskribaĵon kaj la redakcia koboldo enŝovis sen nia scio la erarojn en la cirkuleron.

Sur paĝo 3, 3-a alineo, 4-a linia estas ĝuste anstataŭ 50 eksterlandaj gastoj - 50 eksterbrnaj gastoj. Tuj sub tiu ĉi alineo estas libera loko, kie estis forgesita la surskribo "REZOLUCIO".

Pri la gramatikaj eraroj ni eĉ ne parolas, se kompreneble, sufiĉe da ili en la Tagiĝo aperis. - Ni petas, pardonu ĉiujn ĉi erarojn!

TAGIĜO

MIRU – PENSU - RIDU

La libro, verkita de s-ano P. Bennemann, eldonita de Heroldo de Esperanto, vere bone realigas nociojn de la titolo. Ĝi entenas tri partojn de interesa legaĵo:

Mir u - Priskribais mirigaj aferojn de ĉiuj epokoj de la homaro kaj ĉiu el ni tiamaniere povas kompletigi siajn sciojn pri Ĥeops-piramido, pri sep mirakloj de la mondo kaj pluraj interesaj aferoj.

P e n s u - multaj kapromplioj, enigmoj kaj societaj ludoj povas tre helpi al kursgvidanto vivigi la lecionojn per konvena amuzo.

R i d u - parto de spritaĵoj, anekdotoj kaj bona humoro. Kelkajn por via distro ni ĉi sube represas. La libro estas efektive ĝojiga, instrua kaj havenda por ĉiu nia Junulara grupo.

1. "Mia edzo tute dekutimiĝis de la fumado."

"Je tio oni devas havi fortan volon".

"Mi havas!"

2. Filino de fotografo, kiam ŝi sustrate unuan fojon vidis negron:

"Panjo, vidu: tie kuras negativo!"

3. En Esperanta Kurso. - Kursgvidanto:

"Nomu al ni frazon kun la vorto nebula!"

"Kursanoj: "La vetero estas nebula". Estos nebula tago."

"Ĉi tiu legendo devenas el nebula antikveco". - Kursgvidanto: "Bone! Tre bone! Kaj vi, fraŭlino P., ĉu ankaŭ vi scias frazon kun la vorto nebula?" "Jes, la kubo estas nebula." Kursgvidanto: "La senco de via frazo estas al mi nebula". "Ĉu vere, sinjoro instruisto? Sed ĉu vi iam vidis kubon, kiu estis bula?"

4. Kursgvidantino /50 jara/: Ni traktu nun pri la tempoj. Kiam mi diras: "Mi estas bela! kiu tempo ĝi estas?" "Pasinta tempo, fraŭlino."

5. Dirudo, Muki, la kioman ni havas hodiaŭ?" "Pasinta tempo, fraŭlino." "Sed vi ja havas gazeton en la poŝo, rigardu tie!" "Neeble – ĝi estas de hieraŭ!"

6. Barono Muki estis en montaro. "La strato" li rakontas, "havis kelkfoje klinangulen de 40 gradoj". "Ĉu en ombro?" demandas Bobi.

7. Ĉu vi scias la diferencon inter vagonaro kaj lana kovrilo_!

"Ne, tute ne" - "Nu, vi prove kuŝu sub ili"!

KIAL NI FOTOGRAFAS?

Mi kaj certe ankaŭ aliaj "geverduloj" pripensis la motivon de fotografado dum diversaj konferencoj, kunvenoj, ekskursoj de niaj samcelanoj. Mi mem, bedaŭrinde, ne solvis tiun ĉi problemon. Kial ne? Ĉar ĉiam ni estas fotografataj de kelkaj homoj, sed fruktojn de ilia penado ni neniam vidas. Eble ili estas kontentaj kun sia laboro, se forgesas, ke preskaŭ ĉiuj volus havi memoraĵojn el sia "verda estinteco" kaj eble ankaŭ argumentojn pri vivo de niaj kluboj k.s. Multaj gesamideanoj pli poste plendas, sed nenio okazas. Ĉu ne estus eble ke ĉiu interesulo donu sian adresonkaj antaŭpagon al fotografanto kaj li poste eble sendos fotografaĵojn kaj ni tiel por "eternaj tempoj" evitas eventualajn mallaŭdojn? ---- Por ĉiuj trafitaĵ el estinteco kaj estanteco por estonteco petas

Vlád'a Novotný.

KIEL ASPEKTAS NIA LABORO?

Ĉu ni komencu per plendoj al niaj reg. delegitoj? Bedaŭrinde tio estas necesa. Ĉu almenaŭ legas nian cirkuleron iu el regiono Olomouc /Přerov/? De ili venas neniuj raportoj. Junularo de tiu ĉi regiono bombdu vian regionan delegiton kaj devigu lin sendadi la raportojn pri via laboro al Centrejo. Aŭ estas al vi nia komuna junulara agado tute indiferenta? La samon mi jam ne ripetu al la junularo de Ostrava-regiono. Via RD ankaŭ ne raportas. Ĉu vi tiel helpas al li?

De ceteraj regionoj mi la raporton ricevas. S-ano Křivánek jam rifuzas sendadi la raporton al la RD, ĉar li neniujn ricevas de ili. Kial vi ne plenumas la kondiĉojn de nia konkurso? Certe vi scias, ke raportoj de RD esti inter ĉiuj interŝanĝataj.

Jen mi alportas ĉiujn adresojn de regionaj delegitoj:

RD Praha – Bohemio Centre: Novotný Vl., Tř.pol.věžňů 10, Praha I, Restante.

RD Pardubice – Bohemio oriento: Franc Karel, Okrouhlík 811, Pardubice.

RD Č.Budějovice-Bohemio sudo: Libor Křivánek, Zborovská 1352, Písek.

RD Brno – Moravio Sudo: Werner Jan, Helcoletova 16, Brno.

RD Ostrava – Moravio Nordo: Čermák Josef, Bystřínova 3, Ostrava VI,

RD Olomouc – Moravio Mezo: Fabian Karel, Komenského 22, Olomouc

RD Bratislava - Slovakio: Zvara Milan, Mýtná 45, Bratislava

Pro manko da loko ni raportos pri vivo de niaj grupoj – venonta cirkulero.

REAKTIVIGU ĈIUJN FORTOJN!

Centrejo

Junulara programo en Gottwaldov

Dum la konferenco en Gottwaldov la 6-10 de julio havos nia junularo propran sektion. Okazos tie ankaŭ la tutŝtata konferenco de Junularo, kie ni taksos la laboron dum la pasinta jaro farita. Certe ĉeestos nian konferencon multaj gastoj al eksterlando. Estas nepre necese prepari indan kulturamuzan vesperon. Tial mi instigas ĉiujn grupojn, ĉefe Junularon Praha, Brno, Ostrava, Bratislava kaj aliajn aŭ kolektivajn aŭ solajn programerojn. Pri via programo, kiun vi intencas kontribui al nia vespereto. TUJ skribu al Centrejo /Tagiĝo/ Sciigu la daŭron kaj temojn de programo. NE FORGESU - KAJ KONSIDERU LA TASKON TRE GRAVA!!!

ĈU VI AŬSKULTIS RADIOELSENDON?

La 13-an de aprilo 1955 je la 14-a horo en la parolado pri la kulturo de Ostrava-regiono kaj pri agado de Distrikta komitato de pacdefendantoj prelegis Silezia verkisto s-ro Směja Fran kaj direktoro de teatro de Zd.Nejedlý en Opava kaj funkciulo de pacdefendantoj kaj samtempe nia s-ano Frantl Antonín.

Ili ankaŭ kelkfoje dum la prelego laŭde parolis pri la aktiva laboro esperantistoj en Opava. Estis parolite pri la ekspozicio farota en Hradec apud Opava, kie ankaŭ esperantistoj donos sian porpacan materialon kaj havos sian apartan parton de la ekspozicio.

Ni nur aldonas, ke Esperanto estas tie neentrudeme propagandita kaj la ekspozicio daŭros tutan someron. Ĝin povos ekvidi miloj da vizitantoj.

00000

Ni rememoru la dekjaran datrevenon de liberigo de nia respubliko per ankoraŭ pli granda peno la Pacon konservi kaj ni esperantistoj per ankoraŭ pli granda klopodo disvastigi nian movadon por doni al homaro ankaŭ INTERKOMPRENILON - LINGVON ESPERANTAN.

Junularo kantu!

Jes, niaj instigoj ne ĉesas. Ĝuste tial ni alportas sur tiu ĉi paĝo novan kanton. Ni faru el ni Junularon kantantan – bonhumoran – medion amikan – belan – agrablan. Kun kanto sur la lipoj ni eĉ barojn venkos. Nur provu en la grupo kanti, vi tuj ekkonos la plibonigon de via programo.

Do kantu, kaj skribu ĉu la kantoj plaĉas al vi.

En nia ĝardeno

Nacia kanto libere tradukita de
Midar Alduk

1. En nia ĝardeno kreskas peoni', kreskas peoni', kreskas peoni'.
edziĝu, diris ili, al vi benos Di', al vi benos Di', al vi benos Di'.
2. Promesis al ni /::la amatino jam::/, ĝistombe inter ni /:ke daŭros nia am'.
3. Flustras logeme /:lipetoj ŝiaj plu:/:se havas vi mizeron/:ĉe mi estos du!/
4. Mi edziĝinte /similas al paser'/, mizere pligrandiĝas, /mono en infer'/
5. Jam longe mi devus /putri en la tomb'/, se nia amo daŭru, /laŭ promesa vort'/
6. Iam min batis /nur mia patrinet'/, nun ĉiutage mia /kara edzinet'/
7. En nia ĝardeno /kreskas peoni'/, por kiu help' ne estas, /nur edziĝu li!/

Jakub Brepta

LA APRILA AMO (Al M. V.)

De amo via arda
alvenis nova pruv'
Adoris jen, mi sunon -
kaj sekvis min la pluv'!

Unu Irlandano rigardis sopireme je la interbato, kiu ekestis antaŭ la gastejo. Lastmomente li ne rezistis kaj ekvokis: “Ĉu estas tiu ĉi interbato privata, aŭ estas eble partopreni?”

Okazis en aprilo

Antaŭ ĉio mi devas rakonti al vi pri mia avo. Li estas spite de sia maljuneco ĝaja eĉ diligenta homo kaj por ne perdi superflue la tempon, li elpensadas diversajn aferojn. Lastfoje intensante iom ĝojigi siajn parencojn, li mortis. Jes, tute mortis, miaj okuloj kompreneble larmigis ricevinte la sciigojn kaj en gorĝo al mi sekiĝis. Mi prenis funebran vestaĵon, aĉetis florkronon kaj forveturis

partopreni la funebran vestaĵon, aĉetis florkronon kaj forveturis partopreni la funebran ceremonion. Tiel okazis, ke mi post longa tempo denove ekvidis procesion de nia disbranĉita familio kun ĉiuj onkloj, kuzoj, genevoj, nepinoj kaj ĉu iu scias kiel ankoraŭ ili nomiĝas. Ni proksimiĝis de vilaĝa stacidomo al domo de avo.

Subite malfermiĝis pordo kaj tuta vico da homoj de surprizo restis senmovaj. Antaŭ ni staras iomete kurbita avo, nia propra, entute viva avo! Li ridegas kaj krias al siaj parencoj: - ĝi estas aprilo! Mi volis nur scii kiom da heredontoj mi havas! - Vere tiam estis la 1-an de aprilo.

Do, la avo vivas plu kaj mi de tiu tempo estas tro singardema kaj ne estas tiel facile trompi min per ia "aprilo". Sed malfeliĉo ne iradas sur montojn. Mi foje kun amiko promenis en parko. Volinte momenton ripozi mi preparadis sidiĝi sur benketon. - ĝi estas freŝe farbita! - komencis atentigi min amiko. Sed mi pensis: Jes, tion mi jam konas - aprilo; kaj mi siidiĝis ... Veston mi ĝis nur havas en purigejo /eble ke jam ne, ĉar ĝi povis perdiĝi - oni neniam scias/.

Plue? Aprilo donas ankaŭ ceterajn avantaĝojn. Ekzemple knabinoj povas dum tiu monato promesi amon al ĉiuj siaj admirantoj, ĉar ĝi estas nur "aprilo". Kial do, ne fari kelkajn knabojn almenaŭ dum iu tempo feliĉaj?

Avantaĝo por knaboj konsistos el tio, ke estas pasko kun paska vizitiro. Knaboj regalias knabinojn per paska virgo kaj rekompenco de ili ankoraŭ ricevas donacetojn! Mirinda kutimo! Oni diras, ke ĉi tiun eblecon eluzas kun pasio precipe edziĝintoj.

Interesa monato estas aprilo. Ĝi permesas al lernanto senpune superruzi direktoron; por ĉarmulinoj ĝi estas ekzamena sezono por baldaŭ venonta monato de amo kaj al junaj gesamideanoj ĝi permesos (ankaŭ senpune?) provi la paciencon de redaktoro de Tagiĝo.

Sed ĉe barbo de profeto, karaj junularanoj mi tre petas vin, rilato de poresperanta agado, kunlaboru kun nia cirkulero kaj ne plilongigu por vi aprilon dum tuta jaro!

Tiusamaĉo.

JUNA VOĈO cirkulero de Slovaka Esp. Junularo.

Ni atentigas ĉiujn niajn legantojn, precipe Junularon, ke ili abobonu la bone redaktitan junularan cirkuloron de Tagiĝo - Junan Voĉon. Ĝi raportas al vi pri la Esp. movado en Slovakio kaj instruas kaj distros vin per bona enhavo. Ĉiu aktiva s-ano estu abonanto de JUNA VOĈO. Jen nia deviga devizo. Adreso:- J. Kaczorová, Svit, Penzion II/204.

ŜIPANO RAKONTAS

momento en rondo esperantista

Foje ni kun nia ŝipo ankris en granda pola urbo Vreslav kaj atendis, kiam estos en la rivero Odrta pli multe da akvo, por ke ni povu forveturi.

Mia kutimo estas, se mi ie estas pli longe, tuj eliri kaj trarigardi la tutan havenon kaj ĉirkaŭaĵon. Ankaŭ tiutempe mi foriris el la ŝipo kaj vagadis sencele en la stratoj de urbo Vroclav, kiam mi estis altirita kvazaŭ per ia magneto antaŭ la domon, sur kiu estis afiŝo kun verda stelo. Mi haltigis kvazaŭ hipnotigita kaj rigardis fikse la afiŝon kaj la preterpasantoj ekparolis ion pri frenezulo.

De verdstela afiŝo mi eksciis, ke la grupo de Vroclavaj esperantistoj kunvenadas ĉiumerkrede kaj sabate. Mia tuja intenco estis, viziti sabate ilin. Lastan nokton mi preskaŭ ne dormis kaj kiam alproksimiĝis 18-a horo, mi forveturis per la boateto al la bordo, aŭdinte ankoraŭ krion de mia kunŝipano, ke mi baldaŭ revenu, ĉar li volas veturi per la boato al malproksima dancamuzo.

Mi veturis per la tramo n-ro 14 ĝis la klubejo, kelkajn sekundojn kaj mi kun retena spiro eniris duĉambran klubejon, pri kiu multaj niaj grupoj nur revas. Unua ĉambro estis preparita por multaj vizitantoj. En dua ĉambro troviĝis pli granda kluba libraro, seĝoj kaj tabloj. La muroj estis

ĝuste ornamitaj per diversaj Esperantaj devizoj kaj bildoj. La samideanoj, kiuj alvenis pli frue, ludis ŝakludon, kvazaŭ por montri, ke al internacia lingvo apartenas ankaŭ internacia ludo.

Mi sidis, respondis demandojn, mem diris kelkajn kaj ĝuis la kluban aeron, kiu estis tre ĝoja kaj sincera. Observante geklubanojn mi povas konstati, ke same kiel aliaj E-grupoj, ankaŭ ĉi tiu estis elito de homa socio. La geanoj estas laboristoj same kiel scienculoj, doktoroj, studentoj kaj ĉiuj havas unu celon: interkompreno de la homaro.

Ĉirkaŭ mi sidis du junaj samideanoj, kiuj feliĉigis min per la temperamenta parolado pri verda mondo kaj tute rifuzis miajn protestojn, ke mi devas baldaŭ reveni. Malgraŭ tio, ke mia lango estas pro longa neparolado sufiĉe malmola, ni bone komprenis unu la alian. Komprenebke, ke la kunveno enhavis ankaŭ multe da spritaĵoj, ŝarcaĵoj kaj mi sentis min kvazaŭ hejme.

El la paroloj de samideanoj mi eksciis, ke nuntempe sukcese progresas la komencanta kurso, al kies vicoj post ĝia fino alvenos novaj geklubanoj. Ili pruntedonis al mi ankoraŭ kelkajn librojn el la kluba libraro kaj mi foriris el la klubejo, kie mi tiel bele travivis la parton de sabata vespero.

Tio estas unu el miaj plej belaj momentoj en Pollando. Mi estis feliĉa malgraŭ ke mi devis grimpi la ŝipon pere ŝnurego, per kiu ĝi estis bindita al bordo, ĉar mia kolego iamaniere forprenis la boaton kaj forveturis la amuzajon.

Bela ekzemplo, ke ankaŭ ĉi tie nia lingvo estas vivanta.

Gottwaldov verdiĝos dum ferioj!

ŜPARU JAM NUN MONON por la GRANDA KONFERENCO, kiu okazos de 7-10-a de Julio en GOTTWALDOV!. Nia DEVO estas PARTOPRENI ĝin!!!

10 Ellerni!

Paĝo el la literaturo.

Super la polvo de la mondĥaoso,
en kor-izole sidas kantforĝisto,
juvelojn forĝas li sur vivamboso,
el oro de la ĝoj', arĝento de la tristo.

Ho majstro de la frazo ĝemobrila!
Majstro de l'verso polurita, ĉarma!
Kiel nin sorĉas via art' subtila,
riĉa je l' sentabund' de via koro varma!

Vin ne atakos Tempo la tirano!
Envio li forrabas la renomon
de mi teranoj por malpia mono;
sed por eterne li indulgos vian nomon.

Akceptu do omaĝon de animo
pliriĉigita per helaĵoj viaj
kaj forĝu, daŭre forĝu en sublino,
trezorojn de l' spirit' por koroj simpatiaj.

Tiel kantis skota poeto Jogn S. Dinwoodie en jaro 1951 por glorigi 66-jaran naskiĝdaton de granda tradukisto kaj poeto – Dro Kolomano Kalocsay. Li estas dua eminenta verkisto, kiun ni intencis prezenti al vi sur nia paĝo el la literaturo;

Dro Kolomano Kalocsay naskiĝis en la jaro 1891 en Hungarujo, kiel junulo 20-jara li

ekinteresiĝis pri internacia lingvo kaj ekstudis Esperanton. Por mallonga tempo lin logis IDO, sed baldaŭ konvinkiĝis pri avantaĝoj de Esperanto kaj revenis al ĝi.

La jaro 1921 estis surprizo por esperantistaro, ĉar tiam aperigis juna Kalocsay sian unuan poemaron "Mondo kaj Koro", kiu vekis grandan intereson kaj promesis eminentan talenton. La esperoj ne estis trompitaj. Kalocsay konstante pliriĉigis Esperantan literaturon. Sfero de lia agado ne estis nur originala verkaro, sed ankaŭ – kaj pli poste precipe – tradukado de mondkonataj poetoj. Kaj sur tiu kampo li akiris efektivan majstrecon. Li klopodis ne nur laŭvorte traduki pensojn de nacia poeto, sed li penas pri la ritmo kaj spirito, kiujn li zorgeme transportas el originaloj en tradukojn. Ĉiu vorto havas sian signifon. Kalocsay ludas kun vortoj kaj portas en siajn versojn novan melodion.

Entrepreninte malfacilajn taskojn, kiel ekz. tradukon de INFERO de Dante, mankis al Kalocsay multaj necesaj esprimoj. Li solvis la problemon per enkonduko de novaj vortoj, kiuj ĝis nun ne estis uzitaj de esperantistoj. La vortojn ni nomas neologismojn. /Ekz. amara, tenera, ascendi, adoleska .../ Kaj ĉar li proponis sufiĉa grandan nombron (kelkajn centojn) da neologismoj, li vekis indignon de la konservativuloj, kiuj ŝatis sole Esperanton Fundamentan. La problemo fariĝis centro de diskutoj eĉ diskutoj el diversaj vidpunktoj. Kalocsay daŭrigis sian vojon kaj cetere lian opinion pravigis antaŭ jaroj Zamenhof mem, kiam li skizis evoluon de la lingvo. Sed ofta uzado de neologismoj kaŭzis versimile, ke simplaj legantoj ne trovis ĝis hodiaŭ ĝustan vojon al Kalocsay-arto.

Kalocsay estis ankaŭ scienca teoretikulo de la lingvo. Oni povas diri, ke ilia influo estas sentata preskaŭ en ĉiuj flankoj de Esperanto-teorio: eminenta tradukisto, spertulo koncerne la stilon kaj formon, krom tio brila verkisto originala. Ne malpli meritinda estis lia agado kiel redaktoro de Literatura Mondo, kiu estis eldonata en Budapeŝt; ĝi vere estis instruisto de pluraj verkistoj.

Mirigas nin la granda energio, kiu nepre gvidis K. Kalocsay al efektivigo de tiom multaj taskoj, des pli, se ni scias, ke li estas ĉefkuracisto de iu Budapeŝta hospitalo kaj universitata docento kun ampleksa faka literaturo en lingvo hungara.

Kalocsay vivas nun en Hungarujo kaj post kelkaj jaroj da silento li espereble reaktiviĝos. El lia ampleksa verkaro ni prezentas al vi la plej gravajn verkojn:

1. Mondo kaj Koro poemaro (1921)
2. Streĉita kordo originala poemkolekto. La kolekto estas dividita:
1-a parto dediĉita al Esperanto
2-a parto al problemoj kosma, ama ktp.
3. Rimportretoj poemportretoj de 55 famaj esperantistoj. (Ĉiu poemo estas akompanata de portreto). La poemoj estas spritaj kun bonintenca ironio.
4. Kantanta kamparano en ĝi troviĝas naciaj popolkantoj
5. Johano la Brava traduko el la plej fama hungara verkisto Sandor Pötöfi. Ĝi estas versita fabelo.
6. Romaj elegioj, 7. Taglibro – ambaŭ de Goethe.
8. Infero traduko el Dante. (Laŭ vortoj de la tradukisto: efektive „infera“ laboro. (Ĝi estas ĉefverko en nia tradukita literaturo. Plenan perfektecon konstatis italaj kompetentuloj.
9. Tragedio de l' homo traduko el Emeriko Madach. La verko estas konsiderata juvelo de la hungara literaturo. La traduko laŭ aserto de Baghy egalas originalon.
10. Eterna bukedo antologio el 22 lingvoj de la tuta mondo. La poemoj tradukitaj majstre, atestas pri eksterordinaraj kapabloj de la tradukinto
11. Lingvo, stilo, formo klarigoj pri erare uzatas formoj, gravaj traktatoj pri poezia lingvo Esperanta. La libro legenda por komencantoj-verkistoj.

12. Kiel fariĝi poeto aŭ ... Parnasa gvidlibro verkita kunlabore kun G. Waringhien. Enhavas regulojn de la metriko kaj plenan rinvortaron
13. Plena gramatiko de Esp. Unua vere kompleta gramatiko, verkita ankaŭ kunlabore de G. Waringhien
14. /Dr Antono Hekler/ Arthistorio: du partoj. Kondukas tra homaj epokoj. Ĝi enhavas fotografiaĵojn, kiuj plivalorigas la verkon.
15. E-a enciklopedio redaktita de Kalocsay.

Jen verkaro de iam nelacigebla verkisto Dro Kolomano Kalocsay. En ĉiu lia verko rebrilas granda talento kaj lingva aŭtoritato. Ni legu liajn librojn. El ili ni ĉerpos lingvan sperton kaj konatiĝos kun grandaj ideoj de li majstre interpretitaj.

Van